Wilhelm Hey,

# Ĉu vi scias la kiomon

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉu vi scias la kiomon
de la steloj super ni?
Ĉiu havas sian nomon,
ilin konas nia Di'.
La Sinjoro, kiu tronas
super ĉio, ilin konas;
|:kaj la nombron scias Li.:|

Birdoj flugas tra l' aero,
ĉu vi scias, kiom da?
Bestoj vivas sur la tero,
estas ege multaj ja.
Dio ĉiujn ekvivigis,
la estaĵojn Li estigis.
|:Ĉiuj bestoj laŭdu Lin.:|

Multaj estas la infanoj,
ĉu vi scias kiom da?
Ĉiuj estas en la manoj
de la kara Dio ja.
Li ja scias la kiomon,
kaj Li konas ĉies nomon,
|:amis ĉiun, ankaŭ vin.:|

...

Wilhelm Hey,

# Weißt du wieviel Sternlein stehen

1. Weißt du, wieviel Sternlein stehen
an dem blauen Himmelzelt?
Weißt du, wieviel Wolken gehen
weithin über alle Welt?
Gott der Herr hat sie gezählet,
dass ihm auch nicht eines fehlet
|:an der ganzen großen Zahl.:|

2. Weißt du, wieviel Mücklein spielen
in der heißen Sonnenglut,
wieviel Fischlein auch sich kühlen
in der hellen Wasserflut?
Gott der Herr rief sie mit Namen,
dass sie all ins Leben kamen,
|:dass sie nun so fröhlich sind.:|

3. Weißt du, wieviel Kinder frühe stehn
aus ihrem Bettlein auf,
dass sie ohne Sorg und Mühe
fröhlich sind am Tageslauf?
Gott im Himmel hat an allen
seine Lust, sein Wohlgefallen,
|:kennt auch dich und hat dich lieb.:|

...

*Traduko de la Germana poemo "Weißt du wieviel Sternlein stehen" de* Wilhelm Hey *(∗1789-03-26 – †1854-05-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1983.*

*MR-057 / Arg-737-1488 (2012-12-28 23:20:57)*

*La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/WeisstDu.html`*. Tie troviĝas ankaŭ angligo de la kanto-teksto.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Wilhelm Hey *(∗1789-03-26 – †1854-05-19).*

*Arg-737-1487 (2012-12-29 10:13:03)*

*Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Hey_%28Dichter%29`*. La kanto troviĝas ankaŭ en la protestanta germana kantlibro (n-ro 501).*